

Kanzonoj el la disko Karnavaletto de Olivier Tzaut.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1981 decembro 24.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1981-85/SRI-1981-85-2-543-Claude-kaj-Andree-GACOND-Kanzonoj-el-la-disko-Karnavaletto-de-Olivier-Tzaut.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon, kiam ni ekprezentis al vi la novan diskon de Olivier Tzaut, ni ĉefe aŭdigis al vi la du originalajn kanzonojn, kiujn verkis kaj muzikigis Claude Piron. Krom tiuj du interesaj poemoj, ‘Karnavaletto’, kiu donis sian titolon al la disko mem, kaj la ‘Diamant-ministi’, kiu havas soci-kritikan tendencon, la ok aliaj kanzonoj estas tradukaĵoj. Kvin de Claude Piron kaj po unu de Roger Bernard, Giorgio Silfer kaj Raymond Schwartz.

A.- El orienta Eŭropo, jen juda kanzono pri efemera amo. Tre lerte tradukita de Claude Piron, ĝi estas tiom bone elparolita de Olivier Tzaut, ke neniun alian klarigon ni bezonas aldoni.

(*[muziko](#)*)

Cl.- Aparte flua kaj facile komprenebla estas la traduko de Raymond Schwartz de la ‘[Tri sonoriloj](#)’ de [Jean Villard \(dit Gilles\)](#), franclingva svisa kanzonisto. Olivier Tzaut entuziasme [interpretas](#) tiun rakonton pri la baptito, edziĝo kaj morto de la kamparano Paŭlo Johano. Jen vi aŭdu la unuan strofon :

(*[muziko](#)*)

A.- Ni ŝatus aŭdigi al vi la tradukon de Roger Bernard de kanzono de la ĵus mortinta franca poeto, Georges Brassens. Sed la tempo mankus por prezenti tiun poemon, kiu estas la plej kompleksa en la tuta disko. Ni nur diru, ke la interpretado de Olivier Tzaut distanciĝas de la tiom karakteriza kantmaniero de Georges Brassens.

Cl.- Olivier Tzaut estas parte Provenc-devena, tial li ŝatas kanti en la provenca lingvo, kiu ritme fakte tre similas al esperanto. Jen por konkludi, parto el la mazurko, tradukita de Giorgio Silfer, kiun Olivier Tzaut dulingve interpretas en la provenca kaj en esperanto:

(*[muziko](#)*)

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond prezentis al vi la novan diskon ‘Karnavaletto’ de Olivier Tzaut. Ĝis reaŭdo!